

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 31/08/2017 Tricent-tridek-sepa eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

[Freelang Vortaro](#)

[Plena Ilustrita Vortaro](#)

[Esperanta Retradio](#)

[Google Translate](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Ekstudis pli ol **990,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo

per la angla lingvo. (Ekde la 28a de Majo 2015) <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

Ankaŭ ekstudis pli ol **194,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde la 26a de Oktobro 2016)

Ĝis nun **1,184,000** lernantoj ekstudis Esperanton per Duolingo

La gramatikaj (lingvaj) kategorioj. Ĝ.



Ekzistas kelkaj verboj kiuj povas uzati nur, se oni kombinas ilin kun infinitivo de alia verbo. Ili nomiĝas helpverboj kaj ili estas malmultaj, kaj havas la funkcion de afikso. La helpverboj estas voli, povi, devi, kuraĝi, adi, emi, eki, sukcesi, iĝi, mali, kaj rei. Ili estas netransitivaj kaj do ne povas havi gramatikan Objekton. La tempo de la infinitivo estas sama al la tempo de la helpverbo, kaj ambaŭ agoj okazas. Tiuj helpverboj indikas la tutan agon de komenco al fino de si mem kaj de la infinitivo. Por indiki parton de ago aŭ nefinitecon aŭ por indiki rezulton aŭ antaŭvidon Esperanto, malkiel la eŭropaj lingvoj, uzas adjektivajn sufiksojn, nomitajn adjektivaj participoj, ses da ili. Tio okazas ĉe ĉiuj agoj kaj verboj.

Se oni volas malligi la tempon de la helpverbo for de la tempo de la infinitivo, oni devas uzi anstataŭ helpverbo alian verbon kun Objekto en la formo de infinitivo aŭ substantivo. Jen ekzemploj de tiaj duoblaĵoj kun nuanca signifodiferenco:

“Ŝi povis naĝi” (= ŝi naĝis kaj kapablis) kaj “Kvankam ŝi kapablis naĝi ŝi ne povis naĝi ĉar glacio kovris la akvon” kaj “Mi deziras reveni kvankam mi ne volas reveni nun” kaj “Li devis pagi por la rompo, kvankam leĝe li ne bezonis pagi”, kaj “Bonŝance li kuraĝis elsalti, ĉar mi ne havus la kuraĝon”, kaj “Mi ne havis la emon retroveni sed li emis retroveni”, kaj “Post longa tempo ni ekis iri hejmen”, kaj “Mi sukcesis fini la laboron” kaj “Li longtempe adis fini la laboron”.

(daŭigota)

Marcel Leereveld.



“Malgrava historieto pri mia vivo” (Bob Felby)

Nun AE kopias la tutan libreton iom post iom ĝis la fino.



Bona rakonto kaj bona Esperanto

Ĉapitro 2, Mi plenkreskiĝas, fariĝas laboristo kaj esperantisto (5a ero)

Ni decidis dormi iomete, ĉar estis ankoraŭ mallume kaj malvarme. “Vi iru dormi en la ŝarĝaŭto”, li diris, “mi dormos en la ŝoforejo !”

En la ŝarĝaŭto kuŝis jam iu grandegulo sur la planko. Mi do kuŝiĝis apud li kaj ronkante ni gloris la nokton ĝis la svedo ellasis nin kelkajn horojn poste.

Aĉetinte kafon kaj danajn dolĉbuletojn ni ĉiuj daŭrigis la vojaĝon en la ŝoforejo. Mi eksciis ke la grandegulo estas orientgermano, kiun la svedo kaŝveturigas el Orientgermanujo al Helsingborg en Svedujo. Bedaŭrinde la germano ne parolis Esperanton, sed espereble li tion faras nun, ĉar la svedo estas tre fervora esperantisto.

Mi trovis laboron kiel bakiston de vafletoj. Mia patro jam laboris tie. Mi komencis je la 5-a horo ĉiun matenon, escepte de dimanĉo. Neniu estro komencis tiom frue, do ni povis fari kakaon kaj manĝi la vafletojn dummatene. En la posttagmezoj, kiam la infanoj preteriris de la lernejo, ili ĉiam envenis kaj ricevis kelkajn vafletojn kun kremo.

Mi ankoraŭ memoras ke iun matenon ni atendis la reĝon kaj ties familion, ĉar ili volis, same kiel la posttagmezaj infanoj, inspekti la bakejon, aŭ almenaŭ gustumi niajn produktojn. Al ni ĉiuj estis disdonitaj tute novaj, puraj laborvestoj. Tiam mia patro iris supren en la subtegmentejon por preni papersakon da kakaopulvoro. Sed, ho ve! La sako rompiĝis sur liaj ŝultroj, kaj tute kovris lin per kakaopulvoro. Multe da laŭtega ridado. Ĝuste tiam eniris la reĝa familio la bakejon.

Mi forlasis la bakejon kaj eklaboris en “*Nordisk Kabel og Tråd*”, t.e. norda kablo- kaj dratfabriko. Treege malbona laboro !

Iun ferion mi decidis pasigi en Nederlando. Mi estis aĉetinta mopedon, t.e. motorigitaj pedaloj, kaj elveturis el Danlando, tra Germanujo en Nederlandon. Estis tre interesa vojaĝo. En la unua benzinvendejo en Nederlando grupo da junuloj volis mortigi min, ĉar ili supozis, ke mi estas germano. Feliĉe venis nederlanda maljunulo, parolis al mi en tre malbona dana lingvaĵo, kaj poste klarigis al la junuloj, ke mi ne estas germano, sed dano. Tio ŝanĝis ĉion. La junuloj akompanis min longan vojon ĝis la urbo, kie loĝis mia amiko nederlanda, Felix Kat. Li estis tre feliĉa, kaj tia estis ankaŭ lia kato, ĉar mi venis. Li estis instruisto, ne! ne la kato, sed feliĉa Felix, kaj mi estis bone, eĉ bonege prizorgata dum mia kelktaga restado tie.

De tie mi iris pli suden en Nederlando. Mi laŭiris relative larĝan straton kun nur unu biciklovoĵeto, kaj tiu estis sur la dekstra flanko de la vojo. Kompreneble, por tiuj, kiuj veturis la alian direkton, ĝi estis sur la maldekstra flanko. Kia lando, tiu Nederlando, ĉu ne? Sur tiu biciklovoĵeto oni biciklis en ambaŭ direktoj, kaj mi pensis saĝe, ke tio estas tro danĝera, do mi veturigis la mopedon sur la vojo mem. Tiam venis motorbiciklo kun du grandeguloj. Ili estis policianoj. Fortaj nederlandaj policianoj kun pafiloj. Ili mangestis al mi, ke mi iru sur la

biciklovojon. Do, malgraŭ tio, ke malplaĉas al mi obei ordonojn, mi tamen faris tion, mi ne volis, ke ekestu milito inter Danujo kaj Nederlando, estis jam sufiĉe danĝere aĉeti benzinon en Nederlando, ĉu ne ?

Daŭrigota

Bob Felby



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.



Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendas vin.

La 2an de Septembro estas la unua sabato. Venu. Lernantoj, vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

Mi ĉeestas tiun bonan Esperanto-klubon kaj raportas al AE pri la klubo. Roger Springer



Ĉe la lasta renkontiĝo nia kutima pacema grupeto furioze argumentis ideojn el artikolo kiun Marcel verkis pri Galileo kaj plata mondo, biciklaj butikumoj kaj ĉu oni rajtas ĉar oni kredas ke oni rajtas.

Tiuj punktoj instigis emociplenan diskuton kaj varmegan debaton inter ĉiuj.

Tre bona mateno.

Chris Holliss



Pri transitiveco de verboj

Marcel pravas, ke oni devas lerni ĉu iu verbo estas transitiva aŭ ne. La problemo estas, ke la samaj verboj en diversaj lingvoj aŭ diversaj signifoj povas esti transitivaj aŭ ne. Via gepatra lingvo ne helpas decidi ĉu iu verbo estas transitiva en Esperanto aŭ ne. Ekzemple la verbo "to walk" en la angla aŭ estas transitiva aŭ netransitiva. *I walk around the house.* [netransitiva] *I walk the dog every morning.* [transitiva]. La verbo "habiter" en la franca estas netransitiva: *J'habite en Australie.* La samaspekta verbo "habitar" en la hispana estas transitiva: *La piel que habito* [titolo de bonega filmo de Pedro Almodóvar].

Sandor Monostori



Pri la lingva kvizo de Marcel pri "korekta"

En lia ĉefa verko PMEG, Bertilo Wennergren aperigis la jenan informon.

Korekti = "senerarigi" → **korekta**

1. (bona sed malofta uzo) = "rilata al korektado, senerariga": **korektaj principoj** = "principoj pri korektado", **korekta edukado** = "edukado, kiu korektas (kiu forigas erarojn)".

2. (evitinda sed ofta uzo) = "senerara": ***korekta teksto*** = "senerara teksto". *Ĝi ne estas sufiĉe *korekta**.

Referenco: <http://bertilow.com/pmeg/vortfarado/principoj/finajhoj/a.html#i-uu1>

Mi rimarkis en Interreto dum la jaroj ke tiu sama afero estas ofte diskutata, ĉefe de komencantoj.

Jen bona ekzemplo kie Marcos Cramer klarigis:

The word "korekta" is derived from the verb "korekti", which means "to correct". Therefore its only regular meaning is "characterized by or related to the act of correcting". For example, one can say "korekta laboro" in the sense of "correction work", i.e. the work that consists of correcting something. PIV has another good example: "la korektaj reguloj de presejo", i.e. the rules that a printing house has defined concerning how to correct manuscripts. Note, however, that this regular meaning of "korekta" is only very rarely needed.

Also note that while it is right to say that "correct" cannot be a regular meaning of "korekta", "korekta" has been used in the sense of "correct" by many competent Esperanto speakers, including Zamenhof himself (in his late years). So one can say that "korekta" does in the actual usage have this meaning, even though it is not a regular meaning.

But also note that many competent Esperanto speakers avoid the usage of "korekta" in the sense of "correct" because of its irregularity, as they want to contribute to Esperanto usage becoming more in line with the general rules. The most respected dictionary (PIV) and the most respected grammar (PMEG) both recommend avoiding "korekta" in the sense of "correct". Instead, one should use "ĝusta" or "senerara", depending on context.

Referenco: <https://esperanto.stackexchange.com/questions/2/what-is-the-meaning-of-korekta-and-when-to-use-it>

Mi esperas ke ĉi tiuj du citaĵoj helpas.

Donald Rogers



GRAMATIKAĴO KAJ SOLVO DE KVIZO.

La Komplementoj.

(notu ke mi donadas ĉefliteron al ĉiuj gramatikaj nomoj, pro klareco)

En antaŭa gramatika klarigo mi montris, ke ĉiuj el la nur kvar propozicipartoj (*parts of the sentence*) havas vorton kiu estas la kerno de AŬ Subjekto AŬ Predikato AŬ Objekto AŬ Adjekto (povas esti pluraj). Tia kerno povas esti ĉia kategorispeco (Substantivo, ktp). Mi menciis ankaŭ, ke tian kernan vorton povas difini aŭ pliklarigi aŭ iomete signifŝanĝi iuj ajn el diversaj Komplementoj.

Notu ke la Predikato komplementas la Subjekton, kaj ke la Objekto kaj la Adjektoj komplementas la Predikaton kun sia Subjekto, sed en Esperanta gramatiko ni ne nomas tiujn "komplementoj", sed simple propozicipartoj (kioj ili estas). Do ĉiu Komplemento estas en Esperanto parto de iu propoziciparto.

Ekzistas tri malsamaj Komplementoj 1) la Eпитeto, 2) la Suplemento, kaj 3) la suborda propozicio (Subpropozicio). La Eпитeto estas kutime adjektivo aŭ adverbo senpera (= ne toleras prepozicion). La Suplemento havas, aŭ povas ĉehavi, prepozicion. La Subpropozicio povas aperi ankaŭ en reduktita formo (ekz. "Tiuj portretoj, KIUJN KOPII NUN. estas en tiu ŝranko"). Cetere ankaŭ la propoziciparto povas esti Suborda Propozicio anstataŭ simpla kernvorto (ekz. "Mi trovas malfacila, KOPII TIUJN PORTRETOJN").



Ĉiu Komplemento aŭ parto de Komplemento povas ĉehavi sian propran Komplementon, ekz. “Mi renkontis la filon (= objekta kernvorto) de la patro (= Kompl. ĉe la Objekto), KIU (PATRO) DEZIRAS INTERVJUI MIN” (= parto de la Objekto ĉar Komplemento ĉe “patro”).

Notu fine, ke laŭ sciencaj serĉoj vi ricevos, se vi ricevos, la alcheymran malsanon, kvin jarojn pli malfrue, se vi studos miajn gramatikaĵojn (aŭ alies). Do plia tialo por studi Esperanton, kaj studi ĝian arĥitekturon.

Marcel Leereveld.



Solvo de la gramatika kvizo pri “korekta”.

Mi dankas Franciska Toubale kaj Trevor Steele por en n.ro 336 doni la ĝustajn solvojn por tiu kvizo. Por ripeti ilin:

1). En la Wennergren’a defendo de ‘korekta signifas ĝusta’, nome ke “ĉar ‘korekti = senerarigi’ tial ‘korekta = senerara’” la falso estas ke la dedukto devas esti “ĉar ‘korekti = senerarigi’ tial ‘korekta = senerariga’, do ke io estas korekta nur se ĝi estas senerarig(it)a, kio (korektita) normale ne estas la signifo de la angla “correct”, kio ĝenerale signifas “ĝusta el la komenco, sen ke oni antaŭe korektis ĝin”.

2). En la Broadribb’a defendo “Ĉar ‘falsa’ prezentas la veron mensoge, tial ‘korekta’ prezentas la veron ĝuste”, la konkludo estas falsa, ĉar se ‘falsa’ prezentas la veron per mensogo, do per falsado, tiam ‘korekta’ prezentas la veron per ĝustigo, do per korektado. Alivorte: Ĉar opinio estas falsa nur ĉar iu falsis ĝin, tial opinio estas korekta nur ĉar iu korektis ĝin. Do malĝusta dedukto simila al tiu de Wennergren. Konsekvence la angla (kaj aliaj lingvoj eŭropaj) vorto “correct” povas normale tradukati nur al “ĝusta” NE “korekta”.

Marcel Leereveld.



Semajna raporto de Melburno

LUDVESPERO

Sabaton la 26an de Aŭgusto sep homoj kunvenis ĉe Alchemists Refuge por ludi tabloludojn kaj babili. La drinkejo estas tre plena sed ni sukcese trovis sufiĉe grandan sidlokon. Tie ni penis solvi 2x2 kubon de Rubick, kaj ludis “Friday the 13th” kaj “Codenames Pictures”.

DIMANĈA KUNVENO

Dimanĉon la 27an de Aŭgusto kvin homoj kunvenis ĉe ACMI Cafe & Bar. Ni babilis kaj instruis nian plej novan ĉeestanton.

LUNDA KUNVENO

Lundon la 28an de Aŭgusto kvar homoj kunvenis ĉe Ross House kaj tradukis iom pli da *Mil kaj Unu Noktoj*.

VENONTAJ KUNVENOJ

Ni ne kunvenos lunde je 11/9, 25/9, 2/10 kaj 9/10



Dimanĉon 3an de Septembro je 15:00

[Dimanĉa kunveno](#), ĉe ACMI Cafe & Bar, Federation Square

Lundon 4an de Septembro je 18:30

[Lunda](#) kunveno, ĉe Ross House, 247 Flinders Lane

Sabaton 30an de Septembro je 19:00

[Ludvespero](#), ĉe Alchemists Refuge, 328 Little Lonsdale Street

NUNAJ SEKVANTOJ (Alklaku la nomon por iĝi plua!)

[Meetup](#) – 888

[Instagram](#) – 92

[Facebook](#) – 301

[Telegram](#) – 17

[Twitter](#) – 296

Joanne Johns



Duolingo Kiel ĝi funkcias <https://eo.wikipedia.org/wiki/Duolingo>

La edukado funkcias tiel, ke ĉiuj uzantoj havas "lingvan arbon" kun "branĉoj", kiuj signifas unuopajn temojn - iam temas pri verboj, iam pri adjektivoj, iam pli pri gramatiko aŭ pri temaj vortoj (ekzemple bestoj aŭ manĝaĵoj).

Ĉiu temo konsistas el diversa kvanto de lecionoj, iam temas pri du lecionoj, iam estas eĉ 10 lecionoj. En ĉiu leciono havas uzanto tri vivojn (komence eĉ kvar) - koretojn. Ĉiu leciono enhavas 20 tasketojn. Se oni faras eraron, oni perdas unu koreton. Se la eraro ne estas tro granda, oni povas ankoraŭ korekti ĝin kaj gajni duonon de koreto.



Por ĉiu sukcesa leciono en ĉiu temo oni gajnas 10 poentojn kaj aldone maksimume 3 bonusajn poentojn, se la uzanto kompletas lecionon sen perdo de koretoj.

Lecionojn eblas ĉiam ajn laŭ bezono ripeti. Eblas ankaŭ elekti, ke vi volas ripeti nur vortojn de unu leciono aŭ nur unu konkretan vorton. Tiam oni ja gajnas nur 2 poentojn. Se oni ja estas pli kuraĝaj, oni povas ripeti plej malmulte konatajn vortojn (tiuj vortoj estas elektataj per Duolingo mem laŭ tio, kiom multe la uzanto konas tiujn vortojn) pli rapide per tempe-limigita leciono kaj tiukaze gajni eĉ 20 poentojn (komence estas 30 sekundoj kaj se oni sukcesas, oni gajnas pli da tempo por respondi).

Laŭ kvanto de gajnitaj poentoj ĉiu uzanto estas en certa nivelo kaj tiel oni povas pli facile kompari progreson de aliaj uzantoj.

Strukturo de lecionoj

En ĉiu leciono povas aperi jenaj ekzercoj:

- Skribado de aŭskultita vorto/frazo

- Tradukado de vorto/frazo
- Elparolo de skribita vorto/frazo
- Elektado de korekta mankanta vorto
- Lernado de nova vorto laŭ bildo aŭ laŭ indiko en teksto por traduki
- Elektado de korekta traduko

Roger Springer



El Adelajdo

Amike, **Katja Steele**



Sean Hilton




Benno Lang

La 26-an de aŭgusto Trevor Steele ekzamenis Sean Hilton. Sean sukcese trapasis kaj la skriban kaj la buŝan parton de la baza nivelo de AEA- ekzameno kaj ricevis diplomon de sia instruisto. Surfote: Sean kun Trevor kaj alia sukcesa ekzameninto de antaŭ nelonge - Benno Lang.



Esperanto fariĝis 130 jaraĝa la 26-an de Julio 2017



3ZZZ

La elsendo de la 28a de aŭgusto estis dediĉita al kongresoj pasintaj kaj venontaj, mondaj kaj regionaj. Eblas ankaŭ aŭdi kantojn de la litova grupo, Sepa Asorti, kiu gajigas ambaŭ kongresojn. UK en Seŭlo kaj SAT en Gimpo.



Ĝuu la aŭskultadon **Franciska Toubale** kunvokanto de la Esperanto grupo en 3zzz